EKO
Esperiga Komuniko
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- Gravaj lingvo-kursoj
- Por la hispana
- Por la suahila
- Por la indonezia
- Por la araba kaj la kurda


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-33 sendita el Budapeŝto, la 19an de junio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Kursoj de Esperanto en gravaj lingvoj

## Jen konstruejo por nia estonto!

## Por la hispana lingvo – servo al dudeko da landoj

Kun ĝojo mi diskonigas al la Amerika Komisiono, ke UEA, TEJO kaj Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) kunigis fortojn por liveri senpagan Esperanto-kurson al hispanparolantoj. La kurso okazas kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020). La programo proponas gvidatan studon de Esperanto dum du monatoj laŭ 16 sesioj (po 2 por semajno).

Pri la kurso oni povas legi ĉe https://esperanto.co/cursos/en-espanol. Aliĝado al la kurso restos malfermita ĝis la 26-a de junio. La lecionoj komenciĝos la 29-an de junio kaj daŭros ĝis la 22-a de aŭgusto. Kursfinintoj ricevos atestilon.

UEA alvokas ĉiujn landajn asociojn en Latinameriko kaj ĉiujn komunumojn de hispanlingvanoj en la mondo diskonigi la novaĵon kaj kunlabori kun KEL. Tiu kurso estas tre grava informagado pri Esperanto en la jaro 2020: la hispana estas la dua lingvo kun la plej granda nombro de denaskaj parolantoj, la tria lingvo plej uzata en la interreto kaj grava lingvo en internaciaj rilatoj.

UEA, TEJO kaj KEL esperas allogi la aliĝon de multe da hispanlingvanoj. Efektive en tri tagoj da diskoniga laboro en la sociaj retoj aliĝis jam pli ol 210 homoj! Por komenci tiun agadon KEL kalkulas inter kvar kaj ok instruistoj. Sed depende de la kvanto da aliĝoj KEL bezonos la subtenon de pli da instruistoj. Se vi parolas la hispanan kaj spertas kiel instruisto aŭ pretas helpi kiel kursgvidanto, kontaktu KEL ĉe https://esperanto.co/kontakti.

Vi bonvenas donaci al la Fondaĵo Ameriko de UEA: https://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko. Tio ebligos kompensi la sindonemajn instruistojn per aliĝo al niaj organizoj, aliĝoj al eventoj kaj provizo de Esperanto-libroj kaj instrumaterialoj. Ankaŭ per membriĝo vi subtenas la laboron de UEA: https://uea.org/alighoj/alighilo.

Mi esperas, ke la novaĵo alvenas ĝoje. Opinioj, duboj ankaŭ bonvenas.

Fernando Maia Jr. Universala Esperanto-Asocio Vicprezidanto

# Por la suahila lingvo – por orienta Afriko

Senpaga reta kurso pri Esperanto en la interafrika lingvo suahila komenciĝos per la kunven-programo Zoom la 22-an de junio je la 17:30 de Kab-urbo (UTC +2), gvidota de Elisee Byelongo. Teĥnike zorgas pri la kurso la iranaj esperantistoj. Se vi parolas la suahilan kaj deziras ricevi la ligilon, skribu al renato@esperanto.org.

La foto: La Kongreso en Tanzanio, kie la suahila estas parolata kaj tiu en Indonezio.






# Por la indonezia lingvo – gravega lando

Komenciĝis kurso pri Esperanto en la indonezia (kredeble la bahasa), gvidata en la programo Zoom de la Irana Esperanto-Asocio de Ilia Dewi. Se vi konas neesperantistajn indonezianojn, kiuj volas aliĝi, bonvolu diri al ili, ke ili prenu kontakton kun  Ilian Dewi, <ilia.dewi@gmail.com>.

Dankon al Ilia kaj al niaj iranaj samideanoj, kiuj jam gastigis kurson pri Esperanto en la taja.

Kiu alia parolanto de aziaj lingvoj pretas instrui Esperanton per sia lingvo?

# Araba Esperanto-Kursaro ‘Tibor Sekelj’ el Irano

Senpaga kurso pri Esperanto en la araba per la kunven-programo *Zoom* komenciĝos la 23-an de junio je la 11-a matene laŭ la horo de Teherano,(UTC + 4½) kaj daŭros ĉiu-marde kaj ĉiu-sabate ekde la sama horo dum 22 lecionoj. Se vi deziras aliĝi, skribu tion al <landa.agado@esperanto.org>.

# Kurda Esperanto-kursaro ‘Tibor Sekelj’ el Irano

Reta kurso pri Esperanto en la kurda, variaĵo suda kurmanĝa/sorana, komenciĝos lundon, la 22an de junio, je la 22:00 horo ĝis la 24:00 laŭ la hor-zono de Teherano (UTC + 4½). Ĝi okazos dufoje semajne: lunde kaj ĵaŭde je la sama horo dum 22 sesioj.

Se vi deziras partopreni, skribu al <landa.agado@esperanto.org>.

# Ĝenerala alvoko por la lingvoj de MONA

Estas ĵus kreita en la kadro de la laboroj de la komisiono MONA de UEA la Irana Esperanto-Kursaro je la nomo de 'Tibor Sekelj', kiu celas okazigi per retaj kunvenoj kursojn pri Esperanto ĉefe en la lingvoj de la Meza Oriento kaj de Azio. La kursoj estos poste disponigataj en Jutubo.

Se vi kapablas gvidi kurson pri Esperanto en unu el tiuj lingvoj, bonvolu skribi al landa.agado@esperanto.org



Foto: Assane Faye el Senegalo kun parolantojde la araba lingvo – junaj marokanoj.

====== Vortoj: 625 =====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.